Manfred Hausmann,

# Adoro

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kun nia reĝpotenco ni
alrajdis pezakore.
Tag-nokte neĝis ti ĉi,
dum venis ni defore.

En la kabanon iras ni
infanon ekvidante,
nin klinas antaŭ tiu ĉi,
la manojn kunfaldante.

La mirho estas tie ĉi,
la or' kaj olibano.
Ridetas vi, konfuzas vi
nin tute, ho infano.

Alian ni ja kredis vin.
Ni iras en malhelon,
de l' kapo ni deprenas ĝin,
de l' krono oran belon.

Ja ĉion, kion scias ni,
la tutan homan scion,
ne gravas tio ja por ni,
forgesu ni ĉi tion!

La mio, kiu kreis sin[2]
supere de aliaj,
ho, kie ni nun trovu ĝin,
ĉu en internoj niaj?

Ni klinas nin nun antaŭ vi,
kun aflikteco nia.
Kaj nin klinante sentas ni:
Mizer' finiĝas ĉia.

. . .

Manfred Hausmann,

# Anbetung

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Laŭvorta retraduko*

Mit unserer Königsmacht
ritten wir herbei schweren Herzens.
Es schneite tags- und nachtsüber,
als wir von weither kamen.

In die Hütte treten wir
das Kind erblickend,
wir beugen uns vor diesem,
die Hände faltend.

Die Myrrhe ist hier,
das Gold und der Weihrauch.
Du lächelst, du verwirrst
uns ganz, o Kind.

Wir haben dich anders geglaubt.
Wir treten ins Dunkel,
vom Haupt nehmen wir sie ab,
der Kronen goldene Schönheit.

Ja alles, was wir wissen,
das ganze menschhliche Wissen,
es ist ja nicht wichtig für uns.
Vergessen wir dieses!

Das Ich, das sich erschuf
über anderen,
o, wo soll ich es nun finden?
In unserem Innern?

Wir neigen uns nun vor dir,
mit unserem Kummer.
Und uns neigend fühlen wir:
Alles Elend endet.

. . .

[2] aŭ:
La "mi" kreinta iam sin

Jen skuas la ĉevaloj sin
tintante sonorile.
Sen bruo falas super ĝin
neĝflokoj tre trankvile.

*Traduko de la Germana poemo "Anbetung" de* MANFRED HAUSMANN *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

*Arg-952-1921 (2014-01-10 16:21:40)*

Du schütteln die Pferde sich
mit den Glocken klingelnd.
Ohne Geräusch fallen darauf
Schneeflocken ganz still.

*Traduko de la Germana poemo "Anbetung" de* MANFRED HAUSMANN *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en la Germanan de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04).*

*Arg-952-1926 (2014-01-07 18:53:07)*

*Wörtliche Rückübersetzung ins Deutsche.*
*Laŭvorta retraduko en la germanan.*